

Bulgaria \$0.250
ESPERANTISTO

V-19479/37 (1968)



1968

3

Ĉefartikolo. Al digna renkonto de la 37-a (Nikola Aleksiev)	1
* * * Rezultoj de la Literatura Konkurso	2
Jordan I. Atanasov. 90-jara datreveno de la liberigo de Bulgario	3
J. A. Ĝojiga bilanco pri la jaro 1967	4
Cv. Petrova. Kiamaniere laboras niaj gekolegoj en la provinco	5
Stefan Kiraĝiev. El la ciklo „Mano“	6
Jordan Angelov. Pleven	6
J. Iliev. Unu centjaro depost la naskiĝo de M. Gorkij	6

ORGANIZA VIVO

Konstantin Georgiev, Ilija Andreev, Ĥristo Vodeničarov,	
Enjo Daskalov, Konstantin Kavargikov, A. Tanev .	7
* * * Internaciaj kursoj de Esperanto en Pamporovo	9
* * * Проект за някои изменения в устава на БЕС	11
Il. Andreev. Nova kontraŭkancera medikamento	12
Vasil Slavov. Robert Burns kaj la bulgara lirika popolkanto	13
Nikola Aleksiev. „Dudek horoj“ (recenzo)	16

Kovrilpaĝo: Monumento en Sofio de la medicinistoj, pereintaj en la Liberiga Rusa-Turka Milito 1877/1878.

Abonkotizo : jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv. 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levo por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Ŝuhova ul. D. 5/7 kv. 44, Moskva, M—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**AL DIGNA RENKONTO DE LA 37-A**

Kiel oni scias, jam en la komenco de la pasinta jaro la Centra Komitato de nia Asocio sendis al ĉiuj Distriktaj Komitatoj specialan cirkuleron kaj instrukcion kiamaniere organizi antaŭkongresan konkuradon. Temis ĉefe pri varbado de membroj, kreo de societoj, formiĝo de junularaj sekcioj, abonigo al „Bulgara Esperantisto“. Kompreneble, vice kun la organizaj taskoj ni apelaciis al plivigliĝo de la ĉiufanka kulturkleriga agado de la societoj kaj DK.

Ni devas konstati, ke en multaj lokoj la konkurado donis bonajn rezultojn. Je la unuaj lokoj en la momento laŭ la ciferoj pri kiuj CK de BEA disponas, troviĝas la DK en Smoljan, Miĥajlovgrad, Tolbuĥin, Vraca, Haskovo kaj Ruse. Ekz. en distrikto Smoljan estas fonditaj kvin novaj societoj kaj unu nova junulara sekcio. Estas superita preskaŭ duoble la planita cifero de la membraro, la membrokotizo por 1967 estis pagita en la normala limtempo, la nombro de abonantoj por „BE“ ankaŭ preskaŭ duobligis. En distrikto Ruse estas fondita unu nova societo, la planita nombro de la membraro kaj abonantaro estas superita.

En iuj distriktoj oni atingis laŭ apartaj indikoj tre bonajn rezultojn. Ekz. en Miĥajlovgrad estas pagita la membrokotizo por 808 esperantistoj, pli ol duobligita estas la planita cifero por varbado de abonantoj al „BE“. En distrikto Tolbuĥin oni fondis kvar novajn societojn kaj tri junularajn sekciojn, oni pagis la jarkotizon por duoble pli multe da membroj ol estis planite, tamen postrestis serioze en la varbado de abonantoj. En distrikto Haskovo oni ne sukcesis fondi novajn societojn kaj sekciojn, sed pagis kun ioma supero la membrokotizon por 1967 kaj anstataŭ la planitaj 122 abonantoj varbis 174.

Oni povas montri ankaŭ aliajn distriktajn komitatojn, kiuj ne laŭ ĉiuj indikoj registris la planitajn rezultojn, sed en iu sfero de nia agado havas konsiderindajn atingojn. Sed tio ne estas necesa, ĉar nia tasko estas tute alia ol doni plenan tabelon de la realigitaj planciferoj.

Ni montris tiujn tute aŭ parte pozitivajn ekzemplojn de organizita laŭplana laboro, por montri al la ceteraj distriktoj, ke ekzistas eblecoj por plibonigi sian propran organizan staton kaj tiamaniere renkonti la 37-an kongreson de BEA per novaj sukcesoj sur la kampo de la esperantista tereno. Ni ne ricevas regulajn informojn rekte de la DK de BEA en distriktoj aŭ urboj, kie nia movado havas tre bonajn tradiciojn kaj kompetentajn aktivulojn: Pleven, Stara Zagora, Loveĉ k. a.

Tio serioze malarankviligas CK de nia Asocio. Sen la pozitivaj rezul-

toj en similaj distriktoj ni ne realigos sukcese nian antaŭkongresan konkurencon. Ĉiu facile povas prezenti al si kiom da realaj eblecoj por ĉiutaga plibonigo kaj pliampleksigo de nia tutlanda laboro restas neutiligitaj. Tio devas esti korektita en la mallonga periodo kiu restas je nia dispoŝo. En simila senco estas sendita al ĉiuj estraroj speciala tre konkreta ĉirkuŝero.

Al laboro por ĝia plenumo!

La 37-an ni renkontu per seriozaj novaj sukcesoj!

REZULTOJ DE LA LITERATURA KONKURSO

La literatura konkurso ankaŭ nun vekis intereson inter la bulgaraj esperantistoj. En ĝi partoprenis kamaradoj el multaj loĝlokoj. Ankaŭ en tiu ĉi konkurso ne ĉiuj montris altnivelajn kapablojn kaj talenton en la sfero de la originala verkado kaj tradukado kaj ne ĉiuj ricevas premiojn. La premiitaj verkoj estos sinsekve publikigitaj en „Bulgara Esperantisto“. Ankaŭ iuj el la ne premiitaj verkoj post koncerna redaktado estos publikigitaj.

Komisiono konsistanta el Hristo Gorov, Atanas Lakov kaj Ivan Sarafov tralegis kaj pritaksis ĉiujn materialojn konekse kun la Konkurso („Bulgara Esperantisto“ n-ro 9/1967), konstatis kaj decidis jenon:

I. Por Originalaj versaĵoj en Esperanto: estas prezentitaj 20 versaĵoj de 14 aŭtoroj.

Unuan kaj duan premiojn oni ne aljuĝas.

Triaĵn premiojn oni aljuĝas: a) por la versaĵo „Odo de l' mano“ kun pseŭdonimo „Mano“ (vera nomo Stefan Kiraĝiev el Sofio), kaj b) por la versaĵo „Nova jaro“ kun pseŭdonimo „Revulo“ (vera nomo Todor Ŝoŝev el Sofio).

Kuraĝigajn rekompencojn oni aljuĝas al: a) por la versaĵo „Vi havas“ kun pseŭdonimo „Najtingalo“ (vera nomo Matjo Mateev Nedelĉev el vilaĝo Osenec, distrikto de Razgrad); b) por la

versaĵo „Al la ĉiama juneco“ kun pseŭdonimo Dik (vera nomo Ĥa ĉik Ĥa-ĉikjan el Sofio); c) por la versaĵo „Pleven“ kun pseŭdonimo „Bonŝanculo“ (vera nomo Jordan Angelov el vilaĝo Ĉeŝnegirovo, distrikto de Plovdiv).

II. Por originalaj rakontoj en Esperanto estas prezentitaj 2 rakontoj de 2 aŭtoroj. Oni ne aljuĝas premiojn.

III. Por esperantlingvaj tradukoj de versaĵoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj: estas prezentitaj 7 versaĵoj de 3 aŭtoroj kaj 3 tradukantoj.

Unuan, duan, kuraĝigajn premiojn oni ne aljuĝas.

Triaĵn premion oni aljuĝas por la versaĵo „La morto de Vela“ de Dora Gabe, kaj por la versaĵoj „Kondamnitaj al amo“, „La eta Ĥa“, „Ĉe la tombo de D-ro Andrej Balĉev“, „Vjet-namio“ de Blaga Dimitrova, tradukanto kun pseŭdonimo „Flamo“ (vera nomo Vnelin Mitev el Sofio).

IV. Por esperantlingvaj tradukoj de mallongaj rakontoj el la verkoj de la klasikaj kaj nuntempaj bulgaraj verkistoj estas prezentitaj 2 rakontoj de 2 aŭtoroj kaj du tradukantoj.

Oni ne aljuĝas premiojn.

V. Por originalaj artikoloj: estas prezentitaj 2 artikoloj de 2 aŭtoroj.

Oni aljuĝas kuraĝigan premion por la artikolo „Festo kiu neniam maljuniĝos“ kun pseŭdonimo „luelie“ (vera nomo Nikola Tarakĉiev el Plovdiv).

Vivu la Oka de Marto— Internacia Tago de la Virinoj!



Je la 3-a de marto — 1968, la bulgara popolo celebras solene la 90-jaran datrevenon de sia liberigo el sub la otomana jugo. Ĉiuj bulgaroj tiam esprimas siajn sentojn de amo kaj dankemo al la popoloj de frata Rusio kaj Sovetunio, kiuj dufoje en daŭro de 60 jaroj liberigis Bulgarion el fremda jugo. Samtempe nia popolo esprimas profundan estimon al la multnombraj batalintoj pereintaj por la Liberigo de nia amata Patrolando.

Je tiu glora dato, la 3-an de marto, la bulgara popolo el urboj kaj vilaĝoj metas florkronojn sur la fratajn tombojn kaj monumentojn de niaj liberigintoj, kiuj estas dissemataj tra la tuta lando de Danubo ĝis Rodopi-montaro kaj de Nigra Maro ĝis la rivero Timok.

* * *

Bulgario suferis sub la peza otomana jugo de 1393 ĝis 1878.

La barbara otomana feŭdismo ege malhelpis en daŭro de jarcentoj la evoluon de nia popolo. Tamen la popolamasoj rezistadis por konservi sian ekzistadon, lingvon kaj liberon.

En la epoko de la bulgara renesanco disvolviĝis forta naci-liberiga movado.

Miloj da bulgaroj-volontuloj partoprenis en la rusaj-turkaj militoj dum XVIII kaj XIX jarcentoj. La bulgara popolo firme kredis ke „Avo Ivan“ (tiel karese en urboj kaj vilaĝoj oni nomis Rusion) liberigos Bulgarion. Junaj bulgaroj fariĝis oticiroj en la rusa armeo, kiel, ekzemple, la legenda kapitano Georgi Mamarčev, por helpi la liberigon de sia suferanta Patrio.

En la dua duono de XIX jarcento oni komencis la organizadon de nacia revolucio kun la famaj gvidantoj Georgi Rakovski, Ljuben Karavelov, Vasil Levski kaj Ĥristo Botev.

Tiu revolucia movado organizis la gloran Aprilan ribelon en 1876 j. Ĝi estis kruele frakasita, pli multe ol 30,000 bulgaroj estis mortigitaj kaj dekoj da vilaĝoj kaj urboj estis bruligitaj. Vico da famaj eŭropaj demokratoj, ĵurnalistoj, diplomatoj kiel Ceretev, Makgahan, Skeiler, Darwin, Hugo, Garibaldi k. a. defendis plej energie la suferantan bulgaran popolon.

Plej profundan reĥon la Aprila ribelo havis en Rusio. Multaj bulgaraj gejunuloj ricevistiam sian instrucon kaj edukadon en rusaj lernejoj. En Rusio la bulgaraj gejunuloj sekvis la ideojn de la grandaj rusaj revoluciuloj-demokratoj Ĥercen, Belinskij, Ĉerniŝevskij, Dobroljubov k. a. En tiuj medioj formiĝis la gvidantoj de la naci-demokratia revolucio en Bulgario Ljuben Karavelov kaj Ĥristo Botev.

Elstaraj sciencistoj, verkistoj kaj talentaj kulturaj agantoj kiel Mendeleev, Tolstoj, Dostojevski, Turgenev, Garŝin, Vereŝĉagin k. a. esprimis la volon kaj deziron de la frata rusa popolo pri liberigo de la bulgaroj el sub la otomana jugo.

La 24-an de aprilo 1877 j. Rusio proklamis militon al Turkio. La tuta rusa socio renkontis tiun militon kun aprobo.

La bulgara popolo eksciis pri la milito kun nepriskribebla entuziasmo kaj firma kredo, ke Rusio nepre almitos la liberon de Bulgario.

En junio 1877 j. la bulgaroj renkontis la rusajn armeojn en Bulgario kiel verajn liberigintojn.

Ŝultro ĉe ŝultro kun la rusaj soldatoj batalis ankaŭ la bulgaraj volontuloj sub la gvido de la talenta rusa generalo Stoletov.

Kontraŭ la trioble pli granda armeo de Sjulejman paŝao rusoj kaj bulgaroj

heroe defendis la trapasejon de Ŝipka en la Balkan-montaro. Ĉi tie okazis epopeaj bataloj je 24—27 de aŭgusto 1877. Bravaj bulgaraj volontuloj kaj frataj rusaj soldatoj venkis la turkajn trupojn.

Jen kiel la nacia poeto Ivan Vazov prezentas tiun gloran gefendon en sia versaĵo „Ŝipka“:

„Jen kulminas lasta streĉo de l' batalo,

kaj Stoletoŭ tiam — nia generalo — ekkriegis tondre: „Ho, junaj leonoj, kronu Bulgarijon nun per laŭraj kronoj!“

Urbo Pleven — grava milita fortikaĵo — estis konkerita kaj Osman paŝao militkaptita. En la sieĝo de Pleven partoprenis ankaŭ armeoj de Rumanio.

Malgraŭ la frosta vintro la rusa armeo proksimiĝis al Istanbul.

Je la 3-a de marto 1878 en vilaĝeto San-Stefano estis subskribita packon-

trakto kaj Bulgario estis liberigita post kvinjarcenta sklaveco!

La packontrakto estis renkontita kun granda ĝojo de la bulgara popolo. Bulgario denove fariĝis sendependa ŝtato.

La bulgaroj kore kaj profunde amas siajn fratojn liberigintojn. Ĉiujare ili esprimas sian dankon vizitante la domojn-muzeojn en Pleven, Bjala, Grivica kaj Gorna Studena kaj la centojn da monumentoj. La pereintajn batalantojn por la libero oni prikantas per solenaj kantoj. Tute nature en la sekvantaj jardekoj la bulgara-rusa amikeco transformiĝis en bulgaran-sovetan amikecon, sub kies signo Nova Bulgario faras grandegajn paŝojn en sia moderna evoluado.

Estu eterna la gloro de la rusaj kaj bulgaraj soldatoj falintaj por nia nacia liberiĝo, por la homara progreso.

J. I. Atanasov

ĜOJIGA BILANCO PRI LA JARO 1967

Dum la pasinta jaro 1967 Bulgara Esperantista Asocio kaj la tuta bulgara esperantistaro efektivigis grandan kaj varian agadon.

Regule aperadis la esperantaj revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Nuntempa Bulgario“, „Internacia Ĵurnalistoj“, „Ripozoj“.

En Sofio aperis VI eldono de Lernolibro de Esperanto de Iv. Saraŝov kaj S. Hesapĉiev; Esperanta gramatiko de Violin Oljanov kaj Kunĉo Vălev; Lernolibro de Esperanto de Zora Mladenova Hans kaj Georgi Dimov; en Varna aperis Kurso de Esperanto de Georgi Dimov.

En aprilo estis organizita la VIII Festivalo de BEJ en Kazanlâk. La Estraro de BEJ organizis en Loveĉ la II-an Internacian E-Laborbrigadon.

En oktobro en Smoljan oni organizis solenan celebradon konekse kun la 40-a datreveno de la fondiĝo de E-movado en la distrikto.

Dum la somero oni aranĝis kelkajn kursojn de Esperanto en Druĵevo por komencantoj kaj instruistoj gviditaj de S. Hesapĉiev kaj por komencantoj gvidita de G. Dimov; en Pamporovo — por komencantoj gvidita de G. Dimov kaj por progresintoj kaj instruistoj gviditaj de Kunĉo Vălev.

Multaj alilandaj esperantistaj grupoj gastis en Sofio, Vraca, Dimitrovgrad k. a.

Por la granda Esperanto-agado multon kontribuis la Distriktaj E-Komitatoj. Okazis Distriktaj E-konferencoj en Plovdiv (vil. Râĵevo Konare), Ruse, Veliko Târnovo, Smoljan, Kjustendil k. a.

Krom la Esperantista Tendaro de Bulgara Esperantista Kooperativo en Druĵevo, estas ankoraŭ unu bela loka E-Domo en vil. Borima, distrikto de Loveĉ. Unika en la mondo estas la montodomo „Esperanto“ sur „Vitoŝa-

monto.

Kelkaj Distriktaj Fakoj de Popola Instruado organizis E-kursojn por instruistoj: en Ĥaskovo, Dimitrovgrad, Ruse k. a.

La 4-an de julio en Sofio estis organizita la Unua Nacia Konferenco de la instruistoj kiuj instruas Esperanton en la bulgaraj lernejoj. En la universitatoj de Sofia, Varna, Svištov kaj en kelkaj teknikumoj kaj politeknikaj lernejoj oni instruas E-fakultative.

Granda honoro por Bulgara E-movado estas la elekto de At. D. Atanasov kiel Vicprezidanto kaj de Prof. D-ro Stojan Ĝuĝev kiel membro de la Akademio de Esperanto.

La ĵurnaloj „Rabotniĉesko Delo“, „Oteĉestven Front“, „Zemedelsko Zname“, „Veĉerni Novini“, „Narodna Kultura“, k. a. regule informis pri plej diversaj esperantaj okazaĵoj.

KIAMANIERE LABORAS NIAJ GEKOLEGOJ EN LA PROVINCO

Multaj geesperantistoj instruas la internacian lingvon, sed ne ĉiuj atingas bonajn sukcesojn en sia laboro. Tre ofte kursoj fiaskas. Oni devas substreki, ke la plej konvenaj kursgvidantoj estas la profesiaj instruistoj — la pedagogoj, sed malmultaj estas tiuj, kiuj donas siajn fortojn libervole.

Kiel bonan ekzemplon ni povas montri k-non Mara Kolĉagova, instruistino en Velingrad, kie ĉiujare ŝi gvidas kursojn por komencantoj. En la lernejo „Neofit Rilski“ en kvartalo Ĉepino, meze de la pitoreska pinarbaro estas belegaj kondiĉoj por laboro. La direktoro de la lernejo David Asigov volonte permesis esti organizita kurso de Esperanto. Dank' al tio M. Kolĉagova organizis kurson por 9—10 jaraj infanoj, lernantoj en la tria klaso. Ŝi laboris kun la konata instruista entuziasmo en daŭro de 8 monatoj. La gelernantoj lernis fervore la lingvon kaj finis sukcese la kurson 6 knabinoj kaj 11 knaboj. La instruado okazis laŭ la rekta metodo.

Radio Sofia disaŭdigas esperantajn programojn por eksterlando. Ni esperas ke dum 1968 ĝi komencos disaŭdigi ankaŭ programojn por Bulgario kaj oni organizos E-kursojn per la Radio kaj la Televido.

En la fino de la jaro konekse kun la 80-jara datreveno de la kreo de Esperanto kaj 60-jara datreveno de la fondiĝo de BEA La Nacia Biblioteko kaj Bulgara E-Muzeo aranĝis en la salono de la Biblioteko interesan E-ekspozicion.

La nombro de la E-societoj kreskis de 154 je 176.

Bedaŭrinde mi ne povas skribi pri ĉio kio okazis dum la jaro. Sed evidentiĝas ke 1967 — Jaro de la internacia Turismo atingis rimarkindajn sukcesojn kaj la bulgaraj esperantistoj inde renkontos en majo 1968 en Varna sian 37-an Nacian E-Kongreson. J. I.

K-no Kolĉagova praktikis la instruadon parkere per versaĵoj, kantoj kaj rakontoj kaj tiamaniere la infanoj pliriĉiĝis sian vortaron. Post la deka leciono la infanoj komencis korespondi kun amikoj el Hungario, Sovetunio kaj Germanio.

La plej bonaj kursanoj estis Nataŝa Aleksieva, Cecka Kaneva kaj Kerĉe Bakalova. Ili tre ĝojas kaj ŝatas sian korespondadon.

La patrino de unu korespondantino el Germanio vizitis la urbon Velingrad, kaj ŝi estis sincere renkontita de la malgrandaj lernantoj.

En majo la gekursanoj organizis amuz-programon por manifesti siajn atingaĵojn. La kurso finiĝis per artprogramo antaŭ la gepatroj kaj instruistoj de la infanoj.

Ni devas laŭdi k-non Kolĉagova, kiu donis senpage siajn fortojn al la infanoj. Ŝi daŭrigos sian laboron kaj ni esperas, ke ankaŭ aliaj pedagogoj sekvos ŝian ekzemplon.

Cv. Petrova



EL LA CIKLO „MANO“
de Stefan Kiraĝiev
INFANA

Eta mano
de l' infano!

Vi sin movas
ion trovas.

Per skribilo
aŭ tranĉilo

skribas, pentras,
diligentas.

Ion skizas,
ion ĉizas,

tajlas, boras,
ellaboras.

Kaj perceptas,
kaj konceptas.

Premiita en la Literatura Konkurso

PLEVEN

de Jordan Angelov

Batalo kelkmonata tie spitis,
kun sklavigant' centjara ja militis
la rusa frat'-popolo — por libero
kaj helestonto de l' bulgara tero.

Vi, urbo, ĉarma kun malofta gloro
por ĉiu homo kun bulgara koro —
memorojn en animoj niaj vekas
kaj kvazaŭ en imag' la lukt' reeĥas.

Tra viaj stratoj kaj montetoj plue
sang' frata kie iam arda fluis,
ni monumentojn ofte preteriris
kaj pro la heroaĵo via miris.

Batalo venkoplana kie estis
ni nun la amikecon fratan festis!

Premiita en la Literatura Konkurso

UNU CENTJARO DEPOST LA NASKIĜO DE M. GORKIJ

La granda mondfama verkisto Maksim Gorkij naskiĝis la 16-an de marto 1868 en la urbo Niĵni Novgorod, nun granda industria centro Gorkij.

Maksim Gorkij dediĉis sian tutan vivon kaj verkaron al la bataloj kaj la venko de la laborista klaso en Rusio.

La infaneco de M. Gorkij estis malĝoja. Pri ĝi li skribis poste en sia libro „Infaneco“.

Li estis devigata labori diversajn metojn por nutri sin. Piede, kun sako en mano li vagis tra tuta Rusio, li vidis kaj komprenis la mizeron de la homoj en urboj kaj vilaĝoj.

La kruda vivo fariĝis por Gorkij plej bona universitato kaj li priskribis tion poste en siaj libroj „Inter la homoj“, „Miaj univejsitatoj“.

Kune kun Lenin Gorkij laboris per sia arta parolo en la Komunista Partio en Rusio kaj pro tio li estis ofte arestita.

Post la frakaso de la ribelo en 1905 Gorkij forveturis eksterlanden — en Italio. En 1913 j. li revenis en Rusion kaj daŭrigis sian literaturan kaj revolucionan agadon. Post la Granda

Oktobra Socialisma Revolucio li partoprenis aktive en la kreado de la socialisma kulturo en sia patrolando. M. Gorkij gajnis la amon de la progresemaj homoj en la tuta mondo. Li mortis je 18. V. 1936.

Per sia verkaro M. Gorkij vivas kiel instruanto al la laborista klaso en ĉiuj landoj.

Lenin diris pri Gorkij: „Gorkij estas grandega arta talento, kiu alportis kaj alportos grandan utilon al la proleta movado en la tuta mondo“.

Maksim Gorkij havis pozitivan opinion pri la internacia lingvo Esperanto. Li skribis: „Ĉu Esperanto estas utopio? La konservativa penso obstine asertas, ke Esperanto estas utopio. La vivo, la leĝkonforme evoluanta realo, ne rapidante, sed ĉiam pli decide retutas la konservativulojn“.

Li diris ankaŭ: „Laŭ mi Esperanto estas. . . tute kapabla plu evolui. Jam nun Esperanto havas sufiĉe vastan literaturon. . .“

Jen pro kio li estas amata patrono de la tuturba esperantista societo en Sofio.

J. Iliev



Estis la 17-a de novembro 1967. La societo „Kulturo“ en Smoljan organizis kunvenon en kiu ĉeestis ankaŭ la prezidanto de STELO k-do B. Leonov. En la kunveno oni pridiskutis la demandon pri la neceso de studenta esperantista societo ĉe la instituto. K-do Leonov parolis pri la estonta kongreso de STELO kaj pri la neceso ke en Bulgario estu pli multe da studentaj esperantistaj societoj. La novan societon ni nomis „Flugo“. Ĉiuj esperantistoj estis tre kontentaj ke ni jam

havas nian studentan E-societon.

La estraro de la societo estas: Prezidanto Emil Ĉirpanski, sekretario Kadife Kerimova, kasisto Rosen Karlov, respondeculo pri kultur-klerigaj aferoj Liljana Georgieva, respondeculo pri lerneaj aferoj Arso Boĉukov, kasisto Rosen Karlo.

La nova esperantista societo „Flugo“ ĉe la instruista instituto en Smoljan estas la lasta ido en la familio de la studentaj esperantistaj societoj en nia lando.

UNU TAGO EL LA VIVO DE SOCIETO „FLUGO“

La aŭroro de la nova tago aperis tute nerimarkite. Ĉiuj studentoj-esperantistoj de societo „Flugo“ komprenis, ke la venonta tago restos neforgesebla.

Hieraŭ vespere la prezidanto de la

estas tiel puraj kaj freŝaj kaj ni spiras per nia tuta korpo... Jen estas la aŭtobuso. Baldaŭ ĝi ekveturos. La kantado en la aŭtobuso ĉesis kiam ĝi haltis ĉe la unua lago. Vere fabela beleco! Ni iras laŭ la vojo

al la pli grandaj lagoj kaj la ŝoseo serpentumas preter admirindaj pinarbaroj. Fieraj rokoj ĉirkaŭas la lagojn kvazaŭ ili estus iliaj plej fidelaj gardantoj. La suno brilas kaj ĝiaj radioj kvazaŭ penetras en la bruston, en la koron de la homo. Dum la tuta tago ni kantis kaj kantis. Sur Rodopi-montaro senĉese flugis esperantaj kantoj

Ni estis ĉe ĉiuj lagoj kaj rigardis la trankvilajn akvojn de la granda lago. Subite iu proponis ke per pinbranĉetoj ni faru la literojn de vortoj „Esperanto“ kaj „STELO“.

Nu, ĉio estas preta. Ĉiu prenas po unu litero kaj sur la fotografaĵo ni skribis la vortojn „Esperanto“ kaj „STELO“.

La dua tago de E-societo „Flugo“ restos por ĉiam en nia memoro.

Studenta E-societo „Flugo“



distrikta komitato de BEA k-do Jordan Jordanov diris, ke ni jam havas 10 societojn en la distrikto.

Kaj nun naskiĝis ankoraŭ unu. Hodiaŭ komenciĝas la dua tago en la vivo de nia societo. La aero kaj la naturo

ESPERANTISTAJ TAGOJ DEDIĈITAJ AL LA GRANDA OKTOBRO

La Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj ĝia 50-jara datreveno estis festo por ĉiu esperantisto en Jambol. La estraro de E-societo „Maksim Gorkij“ organizis kelkajn entreprenojn, kiujn ĝi dediĉis al tiu celebrado.

La 5-an de novembro 1967 la prezidanto de societo „Maksim Gorkij“ Dimo Trudoljubov prelegis pri la GOSR kaj la E-movado per la urba radioservo.

La 6-an de novembro 1967 en E-klubejo okazis kunveno, en kiu la vicprezidanto de la societo Georgi Jordanov prelegis je temo „La GOSR kaj la E-movado“.

La 7-an de novembro 1967 en la distrikta ĵurnalo „Naroden Drugar“ (132/133), 7. XI. 1967 laŭ propono de la societa estraro aperis artikolo „Oktoebro kaj la esperantista movado“ de k-do Nikola Aleksiev, prezidanto de CK de Bulgara Esperantista Asocio.

Precipe emocia estis la renkontiĝo de la esperantistoj el la urbo kun la partopreninto en GOSR k-do Krâstju



Zdravkov el Jambol, kiu okazis je la 19-a de novembro 1967. Li interese rakontis pri la bataloj ĉe Caricin, Rostov, Novoĉerkack kaj aliaj. La maljunaj kaj la junaj esperantistoj aŭskultis liajn vortojn kun granda atento.

Konstantin Georgiev

TRIOBLA JUBILEO

La 15-an de decembro en la salono de la Scienc-Teknikistaj Asocioj en Ŝumen kolektigis esperantistoj el la urbo por celebri la gloran trioblan jubileon de la Internaciâ kaj de la bulgara esperantista movadoj.

Ĉe la prezidantara tablo okupis lokon maljunaj veteranoj de la movado k-do Ivan Jankov kaj Ivan Kasabov kaj la reprezentantino de la Urba Komitato de BKP — k-dino Boneva.

Raporton pri la triobla jubileo faris la vicprezidanto de la urba societo Kiril Bogutinski, kiu gvidis la ĉeestantojn tra la jardekoj, observante la vivon de la aŭtoro de Esperanto, la internacian esperantistan kaj la enlandan movadon.

La malnovajn kaj maljunajn esperantistojn honoris per amikaj vortoj la

prezidanto de la societo k-do Atanas Bojaĝiev, kiu enmanigis al la du ĉeestantoj memordonacojn kaj anoncis, ke la societa estraro honoras per memordonacoj ankaŭ la k-dinon Jordanka Silvestrieva, la edzino de la fondinto de la societo, kaj la veteranon Boris Furnaĝiev, unu el la unuaj esperantistoj en Ŝumen, kiuj partoprenis en Universalaj Kongresoj. Fine, la prezidanto anoncis la decidon de la societa estraro nomi tiujn kvar meritintojn „honoraj membroj“ de la societo, kion la ĉeestantoj aprobis per aplaŭdoj.

La kunveno sendis saluttelegramon al CK de BEA kaj al la kunfondinto de la societo k-do Ksenofon Jankov, loĝanta en Sofio.

Ilija Andreev



BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Distrikta Komitato

Nº 120, la 10-an de novembro 1967

SMOLJAN

Al
.
.

Rilate: La Internaciajn kursojn de Esperanto en restadejo „Pamporovo“.

Dum la somero de 1968 por unua fojo Pamporovo — la perlo de Rodopi-montaro — akceptos siajn admirantojn el la tuta mondo — la dezirantoj en tiu mirinda naturo ripozi kaj sampempe lerni, por pliriĉigi siajn konojn pri la dua lingvo de la popoloj — Esperanto.

La unuagrada ripozstacio de la tabaklaboristoj kun siaj komfortaj ĉambretoj kun po du litoj kaj ĉiuj nuntempaj necesajoj, la bela manĝejo, elstaraj instruantoj kaj la mirinda rodopa panoramo sendube favoros por neforgesebla ripozo kaj rapida sukceso en la ekposedo de la Internacia Lingvo kaj progresado en la nobla esperanta afero.

La diversaj grupoj de kursoj daŭros po 20 tagoj kaj estos organizitaj jene:

1. Por komencantoj de la 3-a ĝis la 22-a de julio 1968 j. kun lektoro docento G. Dimov el la Supera Ekonomia „D. Blagoev“ en Varna.

2. Por progresintoj de la 24-a de julio ĝis la 13-a de aŭgusto 1968 j. kun lektoro K. Vălev — instruanto de Esperanto en la Sofia Ŝtata Universitato.

3. Por instruistoj de la 15-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro 1968 j. kun lektoro K. Vălev.

La lecionojn oni okazigos en la bone aranĝita manĝoĉambro, po 5 horoj ĉiutage kun tuta nombro de la horoj por unu lernogrupa — 80 horoj.

Dum la liberaj je okupoj tagoj oni organizos ekskursojn al la famaj lagoj de Smoljan kaj aliaj pitoreskaj anguletoj, kaj ankaŭ interesajn

amuzaĵojn.

Rekomendinde estas ke tiuj el la kursanoj, kiuj povas ludiaŭ havas proprajn muzikilojn, portu ilin kun si.

Kursanoj, kiuj deziras diplomiĝi por iu grado de posedo de Esperanto, povas fari tion en la fino de la koncerna kurso kaj aperi antaŭ speciala komisiono laŭ programo presita en Nº 5 de „Bulgara Esperantisto“ de 1962 j. La koncernan programon — stencilite — ni disponigos al ĉiu petanto.

La kotizo por unu lernogrupa estas 60 levoj por bulgaraj civitanoj kaj 80 levoj por eksterlandanoj kaj inkluzivas jenon: nutrado, tranoktado, rekompenco de la lektoro kaj pagado por pli longaj ekskursoj.

Se iu ekdezirus daŭrigi la studadon en la sekva kurso eĉ en daŭro de kelkaj tagoj — povas fari tion post koncerna pago.

Pro la granda intereso al la kursoj en Pamporovo estas necese, ke oni sendu la kotizon pli frue per poŝtmandato je adreso: „Distrikta E-komitato — Smoljan“. Samtempe oni sendu ankaŭ plenigitan aligilon. Ni supozas, ke la enskribiĝojn ni povos ĉesigi en la fino de monato majo 1968.

Al la ripozstacio de la tabaklaboristoj oni devas veturi al Smoljan. Al Smoljan oni veturas per aŭtobusoj de Plovdiv, kiuj ekiras ĉiuhore. La aŭtoŝtacio troviĝas proksime ĉe la stacidomo de Plovdiv. Ejo en Smoljan, kie la geesperantistoj kolektiĝos estas la Esperantista Klubejo.

Por pli detalaj informoj turnu vin al la Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio en Smoljan. Informojn oni povas peti ankaŭ per la telefono 23—71.

Rodopi-montaro de Spartak kaj Orfej — renovigita — proponas al vi sian faman gastamecon.

Kun esperantistaj salutoj

SEKRETARIO: (s.) Str. Spasov
PREZIDANTO: (s.) Jord. Jordanov

VILAĜO BORIMA, DISTRIKTO DE LOVEĈ.

La 16-an de novembro 1967 estis organizita publika kunveno okaze de la malfermo de la nova E-lernojaro. Pri Esperanto kaj E-movado parolis k-do Nikola Nikolov, prezidanto de la Turista Sekcio „Esperanto“ en Sofio.

La preleginto ilustris sian paroladon per trafaj koloraj diapozitivaj. Oni projekciis la kolorajn filmojn „Bonvenon en Oslo“ kaj „Renkonto kun Fiat“. La ĉeestintaj vilaĝanoj estis tre kontentaj.

Hr. Vodeničarov

CELEBRADO DE ZAMENHOF

La membroj de E-societo „Sukceso“ en Vraca kolektiĝis en la klubejo de Patrolanda Fronto por celebri la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Post mallonga literatura programo k-do Radoslav Tričkov prelegis pri la vivo kaj agado de D-ro Zamenhof.

Post la kunveno oni aranĝis kamarinan vespermanĝon. La amuzado daŭris ĝis malfrue en la nokto.

E. Daskalov



ДО ДИРЕКТОРА НА УЧИЛИЩЕТО

ГР. (С.)

Съвременните международни връзки и широкият културен и стопански обмен на нашата страна с други държави, както и ускореното изграждане на среднородопските курорти и за нуждите на международния туризъм налагат необходимостта да се изучават в училищата и по самостоятелен път най-различни чужди езици.

Между тези възможности изучаването на международния език ЕСПЕРАНТО е едно благоприятно и полезно мероприятие. Езикът есперанто има много опростена граматика, богат речников фонд и логическо устройство на фразата, които го правят лесно усвоим. Благодарение на тези си качества много езиковеди и държавници са изразили своето положително и благосклонно отношение към този език и препоръчват неговото изучаване. Във всички страни на света есперанто се изучава

и ползува. У нас също се изучава в много училища, като в Софийския държавен университет има открита катедра.

За изучаване на есперанто в училищата Министерството на народната просвета е изготвило специална програма.

Лесното изучаване на езика дава прекрасна възможност на голяма част от учащите се да го ползуват в своите кореспондентски връзки с най-различни народи и така посредством интимната размяна на мисли се постига най-резултатно пропагандиране на природните красоти и социалистически преобразования в обновената ни Родина и се съдействува за тяхното комунистическо възпитание.

Във връзка с горното отделът препоръчва на директорите на училищата:

1. Там, където има възможност, незабавно да се открият кръжоци или да се въведе факултативно изучаване на есперанто.

2. Да се съдействува на преподавателите на местното есперантско дружество да включат учащи се и учители в изучаването на езика в техните форми.

За повече подробности и набавяне на учебници се отнасяйте до Окръжния комитет на Българския есперантски съюз в гр. Смолян.

Н-К ОТДЕЛ „НАРОДНА ПРОСВЕТА“:

(п) Ст. Седянков

NOVA FERVOJISTA ESPERANTO-SOCIETO

En la fino de la jaro 1967 en Jambol estis organizita nova fervojista societo kun nomo „Ekspreso“. Ĉe la sta-



cidomo okazis kunveno, malfermita de ingeniero Angel Dimitrov. K-do Dimo Trudoljubov, membro de CK de BEA,

parolis pri la historio de la Internacia Lingvo Esperanto, pri ĝia signifo kiel rimedo en la batalo por paco, komprenigo inter la popoloj kaj demokratio. Krom tio li parolis ankaŭ pri la antaŭstaranta XX Jubilea Internacia Kongreso de fervojistoj-esperantistoj en Varna.

En la fino de la kunveno oni elektis la jenan estraron: Prezidanto — ing. Angel Dimitrov, sekretario-kasisto — Zoiĉka Andonova, membro — Kaljo Stojanov; kontrola komitato: prezidanto — Totka Bratanova kaj sekretario Todorka Georgieva.

Por la nova j esperantistoj oni malfermis E-kurson.

Konstantin Kavârĝikov

ПРОЕКТ

ЗА НЯКОИ ИЗМЕНЕНИЯ В УСТАВА НА БЕС

Измененията се свеждат главно до разработване на глава четвърта, в която се изяснява характерът и устройството на окръжните комитети на БЕС. Прибавя се нов член за съюзното знаме и се разширява онзи член, който уточнява какъв е печатът на БЕС и неговите подразделения.

Други изменения в устава не се налагат, а предвидените в проекта са отражение на опита, придобит с изграждането на окръжните комитети като нови ръководни органи на БЕС в окръзите; въпросът за знамето е явно опущение и се налага неговото регламентиране, особено сега, когато тезисите на ЦК на БКП за работа всред младежта и Комсомола подчертаха по-ярко и значението на знамената за правилното възпитание на трудещите се в патриотичен и интернационалистически дух.

Естествено, приемането на измененията ще направи необходимо извършването на някои редакционни поправки в други текстове на устава, които произтичат от включените нови членове в него.

ОКРЪЖНИ КОМИТЕТИ НА БЕС

Нов чл. 21. Висш ръководен орган на БЕС на територията на окръга е окръжната конференция, която се свиква на две години.

Нов чл. 22. Делегатите на окръжната конференция се избират на събранията на дружествата. Броят на делегатите и начинът на избирането им се определят от окръжния комитет. Конференцията се счита за редовна, ако на нея присъствуват най-малко половината от избраните делегати.

Нов чл. 23. Окръжната конференция изслушва и одобрява отчетния доклад на Бюрото на Окръжния комитет и отчетния доклад на Контролната комисия при ОК. Конференцията приема решения за дейността на окръжната организация и избира с явно гласуване окръжен комитет и контролна комисия.

Окръжният комитет се състои от 9 до 25 души. От своя състав той избира от 3 до 9 души, председател и секретар. Председателят и секретарят се утвърждават от ЦК на БЕС.

Контролната комисия се състои от 3 до 7 души. Тя си избира председател.

Нов чл. 24. ОК ръководи цялата работа на дружествата в окръга между отчетно-изборните конференции и се събира най-малко два пъти в годината.

Бюрото на ОК работи по план одобрен от ОК. Препис от плана се изпраща за сведение в ЦК на БЕС.

Нов чл. 25. ОК прави най-малко веднъж в годината преглед на състоянието на окръж-

ната организация и се отчита за своята дейност пред разширен актив.

Нов чл. 26. Контролната комисия прави най-малко веднъж в годината проверки на финансовото и материалното състояние на ОК, сигнализира пред Бюрото на ОК или на окръжната конференция за констатираните нередности и дава задължителни препоръки за отстраняването им. При сериозни неблагоприятния уведомява и ЦК на БЕС.

Членовете на КК по право участвуват в заседанията на ОК и на Бюрото с право на съвещателен глас.

Нов чл. 27. Решенията на ОК и на Бюрото са законни, ако се вземат в присъствието поне на половината плюс един от членовете им и ако за тях са гласували повече от половината присъстващи.

Нов чл. 28. За задачите на окръжните комитети ЦК на БЕС изготвя нарочна инструкция.

Старият чл. 21 става чл. 29, като текстът си остава същият. Внася се редакционна поправка в смисъл, че преписи от учредителния протокол се пращат на ОК и на ЦК на БЕС, че утвърждаването на новото дружество се извършва от ОК, който уведомява за това както дружеството, така и ЦК на БЕС.

Старият чл. 22 се премахва изцяло.

Старият чл. 23 става чл. 30, като ЦК се заменя с ОК в края на текста.

Старите членове 24 и 25 стават респективно 31 и 32.

Нов чл. 33. В градове, където има повече от едно дружество, се образува градски комитет на БЕС от представители на дружествените ръководства. Градските комитети имат само координационни функции. Избират си председател и секретар, които се утвърждават от ОК. В окръжните градове такива координационни комитети не се създават, тъй като техните функции се изпълняват от окръжните комитети.

В буква „а“ на стария чл. 26 (сега 34) точката се заменя със запетая и добавят думите: „а разпределението му се утвърждава от пленум на ЦК“.

Старият чл. 27 става чл. 35 със следния текст:

Печатът на БЕС, ОК и дружествата е кръгъл, в средата е петолъчка, а около нея надпис: за ЦК — Булгара Есперантиста Асоциация — Центра Комитат; за ОК — Булгара Есперантиста Асоциация — Дистрикта Комитат, а под звездата се поставя името на града; за дружествата — Булгара Есперантиста Асоциация-Социето „“, а под звездата — името на селището.



Нов чл. 36. Съюзното знаме е от зелен копринен плат. В горния си вътрешен ъгъл има квадратно бяло поле със зелена петолъчна звезда. От върха на пръта се спускат два шнура в националния трицвет, които завършват с пискюли.

От двете страни на знамето е извезан със златисто-жълти букви съответен текст, посочен в предходния член.

Нов чл. 37. По-подробни указания относно знамето ЦК на БЕС дава със специална инструкция.

Забележка: Без да се вписва в устава, предлага се разпределението на членския внос да става така: за дружествата — 40%, за ОК — 20%, за ЦК — 40%.

NOVA KONTRAŬKANCERA MEDIKAMENTO

La naŭan de aŭgusto 1967, dum la naŭa Baltlanda Esperantista Tendaro en Vilnius (Sovetunio) kuracisto-esperantisto Vasilij Mihajlovič Novickij el urbo Ljvov faris prelegon pri nova kontraŭkancera medikamento „amitozin'o“.

La medikamento amitozino estas inventita de kuracisto-sciencisto Anatolij Ivanovič Protopalskij el Ukrainio. Tre interesa estas tio, ke la medikamento de Protopalskij neniel influas al la kreado de la sango.

Dum la ĝisnunaj eksperimentoj la medikamento amitozino evidentigis tre bonajn kvalitojn. Ĝi malaperigas la ŝvelaĵojn kaj la metastazojn¹ ĉe 30% de la malsanuloj al kiuj estis aplikita.

En la ĝisnunaj eksperimentoj medikamento amitozino evidentigis efika pri jenaj diagnozoj:

kancero de mamo, kancero de korpuso de la utero, kancero de la koleto de la utero, kancero de la ovario, melanomo malignuma², kancero de la lango, kancero de la nazfaringo, kancero de la laringo, kancero de la urinveziko de la virino,

sarkomo³ de la prostato.

La medikamento de Protopalskij evidentigis efika ankaŭ kontraŭ la bonkvalitaj tumoroj (ŝvelaĵoj) kiel: fibri-

miomo, polipoj, papilomoj⁴, adenomoj⁵.

Per tiu ĉi medikamento estis kuracitaj dekoj da homoj, kiuj estis en tre senespera stato. Docento pri Medicino Jeŝi Mejza el la Varsovia Onkologia Instituto, post la konatiĝo kun la rezultoj de kuracado per amitozino, de pacientoj el Pollando: Ĉeslaw Kretovič el Gdansk (diagnozo — melanomo malignuma), Veronika Gumovska el Torunj (diagnozo — kancero de la mano), Bogdan Seŭ el Elblag (diagnozo — sarkomo) agnoskis ke la medikamento amitozino estas plej bona kontraŭkancera rimedo en la nuntempa tutmonda medicino.

Post la prelego estis prezentitaj notoj pri la historioj de la malsanoj de la resanigitaj pacientoj, kio ebligis pli bonan ekkonon de la rezultoj, atingitaj per aplikado de amitozino fare de la medicinistoj.

Il. Andreev

(partopreninto en la Tendaro)

1. metastazo = fokuso de tumoraj kanceraj formaĵoj.
2. melanomo malignuma = malbonkvalita ŝvelaĵo.
3. sarkomo = malbonkvalita bulformaĵo.
4. papilomo = aknotipa formaĵo sur la mam-pinto, sur la lango kaj sur aliaj organoj.
5. adenomo = formaĵoj en regiono de la limfa sangokondukiloj.

Ne sufiĉas nur esti naturdefendanto.

Vi devas esti unue naturamantoj. Tiam vi estos vera naturdefendanto.

Ĉar la amo estas viviga.

Ncme pro tio la arbaramanto scias kiam kaj kiom haki kaj kiam kaj kiom planti de la verda abundeco de la tero.



de Vasil Slavov

„Je la 20-a de septembro, 1949, kiel unu el la viktimoj de la reĝimo de kulto al la personeco en nia lando, mi subite troviĝis en la Centra Malliberejo de Sofia, kaj post kelka tempo — en aliaj malliberejoj. Disponante pri tiom multe da „libera“ tempo, kiel neniam antaŭe, mi komencis kolekti folklorajn materialojn, per la helpo de miaj samsortanoj. Tre agrable mi estis surprizita, kiam mi ekkonis nian bulgaran popolkanton „*Ĉu estas vere, ho mia amato?*“, ĉar ĝi tre similis al la populara versaĵo de la fama angla poeto Burns „Ho, mia amo estas kiel ruĝa, ruĝa rozol!“ En tiuj ĉi du kantoj la esprimmaniero kaj la subjekto — la vera nevenkebla amo — estis tre, tre similaj? Tio impulsis min serĉi ankaŭ aliajn proksimajn al la bulgaraj lirikaj popolkantoj versaĵojn kaj lirikajn kantojn de aliaj popoloj. Rezulte de tiu ĉi mia esplor-okupado, aperis la publikigitaj jam en „*Bulgara Esperantisto*“ artikoloj „*Simileco inter la motivoj en la bulgaraj, rusaj kaj serbaj lirikaj popolkantoj*“. Mia nuna artikolo estas la lasta el tiu ĉi serio.

Mi menciis en mia unua artikolo, ke en la fora pasinteco, kiam oni verkis la bulgarajn popolkantojn, nur la junaĝo de la tiama bulgaro estis relative feliĉa kaj senzorga. Pro tio ja oni strebis profiti la ĝuojn de la vivo kaj travivi tiun ĉi mallongan periodon de juneco pli intense, pli emocie, tiel ke poste „bedaŭro ne restu!“ Tio estis la iama ŝatata temo de la anonima popolkantisto —

Heroldo anoncas tra urbo,
tra urb' ĥitimano anoncas:

— Ĉe kiu vestar' bona estas,
li uzu ĝin ĝis la eluzo;
ĉe kiu ĉeval' bona estas,
li rajdu ĝis li rajdsatiĝos;
kaj se belulinon li amas,
li amu ĝis li amsatiĝos,
ĉaj jaroj malpacaj alvenos,
kaj li ne bedaŭru post tio!

Mi jam citis la kanton „*Miglana Belulino*“, en kiu la junulino permesas al sia amato kisi ŝin, sed nur ĉe kondiĉo —

Postsignon sur mi ne lasu,
ke bofratino ne vidu —
ŝi estas ege malbona,
al mia frato ŝi diros!

Ĝuste tia estas ankaŭ la amo de la amatino en la versaĵoj de Burns. La sincera junulino same tiel intense travivas sian unuan amon kaj ankaŭ postulas de sia „junulo“ esti atenta kaj singarda, por ne elmeti ŝin al kritiko —

— Vi ekfajfu — mi alvenos, ho, junulo mia,
vi ekfajfu — mi alvenos, ho, junulo mia!

Kvankam koleriĝos patro kaj patrin', alia,
vi ekfajfu — mi alvenos, ho, junulo mia.
Sed atentu kiam vi ĉe min alvenos,
tre singarde tra la flanka pord' eniru,
poste — supren, tiel ke neniuj vin ekvidu,
sed ŝajnigu, ke ĉe min vi ja ne venas,
sed ŝajnigu, ke ĉe min vi ja ne venas!

La bulgara popolkanto priskribas la bulgaran junulinon kiel tre postuleman, kiam ŝi elektas sian kunulon „por la tuta vivo“. Por ŝi gravas nur la karaktero de la amata junulo, sed ne la riĉaĵo, nek la socia rango, kiuj ne povas ŝin allogi. . . Por defendi sian amon, ŝi eĉ povas kontraŭstari kuraĝe al siaj gepatroj —

— Radka, amata filino,
mi vin al Venko ne donas,
vin edziniĝos al Neno.
La dom' de Neno — pli alta,
liaj ĝardenoj pli vastaj,
havas li agrojn herbejojn
proprajn kaj densajn arbarojn.
Violonist' estas ja Venko,
domon ne povas prizorgi,
ĝin ne provizos je mebloj.
Al patrin' Radka respondas:
— Mia patrino maljuna,
mi kun li vivos du tagojn,
tri tagojn poste malsatos,
sed edziniĝos al Venko!

*

— Milkano, knabino Milkano,
Milkano, vi bunta kokido!
Nun aŭdu la volon de l' bejo:
— Forvendos mi mian farmdomon
en miaj mi manoj vin kaptos.
— Ja via farmdomo ne kostas
la prezon de mia lumbeto! . . .
— Milkano, vi bunta kokido,
mi mian grenkampon forvendos
en miaj mi manoj vin kaptos.
Milkano denove respondas:
— Ho, turko, vi stulta, malsaĝa,
grenkamp' via nur ja valoras
la koston de mia hararo!

*

— Ho, Stanka, vi dommastrino,
ĉe vin mi volas sidiĝi,
ĉe vian dekstran genuon.
— Bajno-le* bati* Ivane,
jen estas lok' je dispono,
sed via tempo forpasis,
kiel forpasas la tempo

* Bajno, bati — alparolo respekta al pli aĝa viro.



de ĉevalaĉ' por vetkuro
 kaj de bubal' por jungado.
 — Vi ne rigardu la tempon,
 Stanka, rigardu havaĵon —
 el ormoneroj, riĉaĵoj,
 bovstabloj ĉiuj plenplenaj,
 kaj deponejoj kun greno!
 — Estu havaĵo damnita!
 Jam via tempo forpasis!

La heroino de *Burns* tute naive konfidas
 sian amon al amikino Titi kaj petas ŝin doni
 konsilon: ĉu edziniĝi al junulo amata — Tom
 Glen:

— Jam, ho, Titi, suferegas mia koro,
 mi konsilon vian petas jen;
 kolerigi la gepatrojn, ho, doloro!
 Sed mi kion faru sen Tom Glen?
 Mi atendas: kun kunulo bona tia
 estas nur malriĉo — ne malben';
 kaj ne gravas la havaĵ', riĉaĵ' por mi ja,
 se ne edziniĝos mi al Glen! . . .
 Venu, Titi, donu urĝe vi konsilon!
 Mi kokinon donos kaj kun ben',
 se vi rekomendos iĝi mi edzino
 al amata mia knab' — Tom Glen!

Sed kiam necesas, ŝi ankaŭ abrupte kaj de-
 cide eldiras sian malestimon al la riĉaĵoj de
 sia neamata adoranto-alloganto:

— Kie loĝas vi, ho, bela junulino?
 Kaj nun nomon vian ĉu vi volas diri?
 — Mia nomo estas Ĵan, la sinjorino,
 kaj mi kun karbisto mia emas iri. . .
 — Ĉu vi vidas tiujn ĉi montetojn, valojn,
 super kiuj sunradioj brilas tiel?
 Ili estas miaj kaj estiĝos viaj,
 se karbiston vian vi forlasos iel. . .
 — Se vi havas ĉion, kion sun' lumigas
 kaj eĉ kion kaŝas ter' en sino sia,
 ĝin rezignos mi kaj min por ĉiam ligos
 kaj interbrakumos kun karbisto mia. . .
 Sciu: gravas por mi reciproka amo,
 kaj la kabaneto, eta domo mia,
 kaj la mond' en kiu gajnas mi la panon
 kaj feliĉon donas al karbisto mia. . .

(*„La Eazino de la Karbisto“*)

*

. . . Vi povas grenkampon aĉeti per oro,
 kaj ankaŭ bovinojn, kaj ŝafojn aĉeti;
 sed mildan, plenplenan kun am' karan koron
 neniam vi povus per oro aĉeti. . .
 Scipovas nur am' malpezigi la ŝarĝon,
 se ambaŭ kun Robi ni estos malriĉaj;
 nur amo kunportas gajecon, kuraĝon —
 ĉu estas reĝino ol ni pli feliĉa?

(*„Vilaĝa Junulino“*)

Per egale varmeta kompato priskribas kaj la
 bulgara popolkanto, kaj ankaŭ *Burns*, la su-
 feron pro la perfido de la amato kaj ili kon-
 damnas la malfidelecon. En la unuaj artikoloj
 mi jam citis la bulgaran popolkanton „Ho, vi
 vlnberejo kun vinbero blanka!“ Nun mi citos
 eltiraĵon el du versaĵoj de *Burns*:

Vi forlasis min por ĉiam, Ĝimi,
 vi por ĉiam min forlasis.
 Vi por ĉiam min forlasis, Ĝimi,
 vj por ĉiam min forlasis!
 Ofte vi al mi promesis: „Morto
 povus nur disigi nin.“
 Nun por ĉiam vi forlasis min —
 mi neniam plu vin vidos, Ĝimi,
 ho, neniam plu mi vidos vin!
 Vi forlasis min, ho, Ĝimi! . . .

Certe, Ĝo, vi amas nun alian
 kaj disrompis mian koron vi!
 Baldaŭ, laca, mi okulojn miajn
 fermos, kaj ne plu vekiĝos mi,
 kaj neniam plu vekiĝos mi. . .

Jen kun kia indigno priskribas *Burns* la
 okazojn, kiam la junulino edziniĝas pro ko-
 mercaj interesoj —

Sciu kion Meg de l' muelej' akiris! . . .
 Ŝi akiris stultan riĉan bienulon,
 lasis mueliston sian amkunulon!
 Estis muelisto granda, rozkolora,
 bela, bonstatura, svelta kaj bonkora,
 kaj la bienulo — eta kaj avara.
 Sed ŝi lin preferis ol la amon karan!
 Ho, ve! Ve al mono ĉie trudiĝanta,
 ve al am' kun farmbien' liganta! . . .

(*„Meg de la Muelejo“*)

Fine mi devas denove citi la jam menciitan
 versaĵon de *Burns*: „Ho, kiel ruĝa rozo estas
 mia amo!“ kaj komparele apudmeti la bulgar-
 ran popolkanton „Ĉu estas vere, ho mia amato?“
 por montri ankoraŭfoje la proksimajn artri-
 medojn, per kiuj estas priskribita la granda
 vera amo, daŭranta ĝis „senakviĝo de la
 maro“!:

Ho, kiel ruĝa rozo estas mia amo,
 unuafoje ekfloranta dum junio!
 Ho, kiel milda kanto estas mia amo,
 sonanta ĉiam dolĉe kaj en harmonio.
 Ho, kiel bela estas vi, knabino mia!
 Tiele ĉiam pli kaj pli mi enamiĝos
 kaj mi konstante amos vin, amata mia,
 ĝis kiam ĉiuj mondaĵ maroj senakviĝos!
 Ĝis kiam maroj senakviĝos, mia kara,
 kaj la ŝtonegoj kun la suno kunfandiĝos,
 kaj mi ĝis tiam amos vin, ho mia kara,
 ĝis kiam ĉiuj sabloj de la viv' moviĝas.
 Kaj nun adiaŭ, ho, unika mia amo!
 Ĉar devas mi nur provizore vin forlasi. . .
 Sed mi revenos, nepre, se kun mia amo
 eĉ pli ol dek mil mejlojn devus mi trapasi!

Ĉu estas vere, ho, mia amato,
 ke ne akceptas min via patrino,
 ĉar mi etkorpa ja iel elkreskis,
 bone ne povas mi, laŭ ŝi, mastrumi,
 servi bopatron mi kaj bopatrino. . .
 Ŝi do ekvolis nin ambaŭ disigi!
 Ŝi nin, amato, ja povus disigi,
 sed nin disigos ŝi tre malfacile —



kiam, amato, la mar' senakviĝos,
 kiam estiĝos ĝi seka plataĵo;
 kiam kun bovoj ĝin oni displugos
 kaj vinbertrunkojn en ĝi oni plantos,
 poste vinberojn el vitkamp' rikoltos,
 kaj el ĝi vinon preparos, amato —
 tiel nur povus mi tute ebria,
 vinon trinkinte, ho, mia amato,
 iom forgesi vin, mia amato!

Ne malpli interesa ol tiu komuneco en la motivoj estas ankaŭ la proksimeco de la artrimedoj de la kantoj. Ĉe Burns, kiel poeto kun tiel alta arta matureco, estas tre karakteriza la simpleco per kiu li priskribas la profundajn sincerajn sentojn de siaj herooj el la popolo; ila vigla laŭnatura ritmo; la uzo de refrenoj; la maniero ripeti la samajn vortojn ofte kun novaj nuancoj. Tiamaniere li atingas plej grandan esprimopovon. Tre interesa ankaŭ estas lia lingvaĵo kun tre vera kono de la viva popola elparolado. Kaj ĝuste tiaj estas la plej karakterizaj trajtoj de la bulgara popolkanto.

Vekas intereson ankaŭ la demando pri la kaŭzo de tiu ĉi proksimeco.

Robert Burns estis vera popola poeto en la plej ĝusta senco de la vorto. Li ĉiam vivis kun la suferoj kaj la malgrandaj ĝojoj de sia skota popolo. Estas bone konata la ligo de lia verkaro kun la *Skota popola kanto*, kiun li plej bone konis, kiu inspiris lin, el kiu li ĉerpis per plenaj manoj.

Kaj en la *Skota Popolkanto* estis spegulita la vivmaniero de popolo malgranda kaj malriĉa, kiel la bulgara, same tiel subpremata en

la pasinteco, kaj kiu sammaniere konservis ĝis la plej nova tempo la tradicie fidelan spiriton, viglan kaj veran junulan amon kaj rimarkindan familian sindonemon.

Tiuj cirkonstancoj klarigas la unuavide strangan proksimecon inter la bulgaraj popolaj lirikaj kantoj kaj la lirikaj versaĵoj de *Burns*.

Oni povus kontraŭargumenti, ke la montritaj ĉi supre kvalitoj de la bulgara popola lirika kanto ne estas specife ĝiaj; ke tiajn posedas ankaŭ aliaj eŭropaj popolkantoj. Eble tio estas vera. Sed tiu ĉi cirkonstanco ne malgrandigas la indikitan proksimecon inter la bulgaraj lirikaj popolkantoj kaj la lirikaj versaĵoj de *Burns*. Ĝi nur memorigas, ke la proksimeco inter la eŭropaj popoloj estas multe pli granda ol oni ordinare opinias, kaj ke nun, kiam la grandega antaŭensalto en la kultura, scienca kaj teknika evoluo rapide forigas la barojn inter landoj kaj popoloj, tiu ĉi proksimeco konstante fariĝas pli kaj pli granda. Senhalte pligrandiĝos ankaŭ la ligo inter la arto de la veraj popolaj poetoj kaj la aspiroj de la popolamasoj kie ajn kaj ĉe kiuj ajn politikaj sociaj reĝimoj ili vivadas. Kaj tiujn, ĝuste tiujn aspirojn esprimis *Burns* antaŭ pli ol 170 jaroj —

... Finon de l' sklavec', mizer', pli bonan ordon,
 metos la popoloj, kaj la ŝtatoj, frato,
 kaj ekvivos la homaro en konkordo,
 kiel unu famili' unika, frato!

[(„Arbo de la Libero“)

SOLENA E-KUNVENO EN KARLOVO!

La Urba Komitato de Patrolanda Fronto, Urba Komitato de Komsomolo, Popola Legejo (Kulturdomo) „Vasil Levski“ kaj E-societo en Karlovo organizis je la 16-a de decembro 1967 tuturban solenan kunvenon, dediĉitan al la 108-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, 80-jara datreveno de la kreo de Esperanto kaj 60-jara datreveno de la fondiĝo de BEA. En la kunveno partoprenis studentoj el Sofio, esperantistoj el Sopot, Plovdiv k. a.

La kunvenon malfermis la prezidanto de la societo k-do N. Ganev. K-do Mihail Danĉev el Plovdiv salutis la kunvenon je la nomo de CK de BEA kaj DK en Plovdiv. N. Uzunov parolis je la nomo de la bulgaraj gejunuloj-esperantistoj. Oni emfazis ke la junuloj-esperantistoj el Karlovo distingis en

la Internacia Esperantista Laborbrigado en Loveĉ.

Pri la vivo kaj verko de Zamenhof prelegis Bojdar Leonov, prezidanto de STELO. En la fino la preleginto substrekiis, ke Esperanto povas kaj devas servi al la paco en la mondo.

La kunveno sendis gratulotelegramon al CK de BEA kaj protestan telegramon al la Registaro de Usono kontraŭ la agresa milito en Vjetnamio.

La junulara kantgrupo kaj amatoraj ensembloj plenumis varian literaturan-muzikan programon. Kantistoj ankaŭ solistoj.

Oni aranĝis tombolon.

Post tio komenciĝis la junulara balo, kiu daŭris ĝis malfrue en la nokto.

A. Tanev

„Dudek horoj“, kroniko de Ferenc Sánta, tradukis el la hungara V. Beniczik, I. Botos, L. Somlai, L. Tárkony, redaktis K. Kaloczay. Libroeldonejo Corvina, Budapeŝto, 1966, pĝ. 234.

La bele eldonita sur luksa papero novelo „Dudek horoj“ donas tre interesan bildon pri la vivo en la hodiaŭa hungara vilaĝo. La leganto povas en interesa literatura formo sekvi la evoluon de la psikologio de hungaraj vilaĝanoj en daŭro de la lastaj dudek jaroj. La aŭtoro tre majstre pentras diversajn tipojn de vilaĝanoj kaj tre realisme montras ilian starpunkton rilate la grandegan transformiĝon en la terposedado kaj kulturado en Nova Hungario. Per malmultaj sed tre elokventaj vortoj, metitaj en la buŝo de la herooj de tiu ĉi novelo, la aŭtoro donas eblecon al la legantaro ricevi imagon pri la pezega vivo de la vilaĝanaro sub la tiraneco de la grandbienuloj en malnova Hungario. Sen ia ajn timo li montras ankaŭ kiel malfacile ŝanĝiĝas la psikologio de certaj grupoj de la vilaĝanaro post la radikalaj ŝanĝoj en la sfero de la materiala terproduktado, post la fondiĝo de kolektivaj kaj ŝtataj mastrumoj en la vilaĝoj.

Kompreneble, ni vidas ankaŭ la poziciojn de la plej konsciaj reprezentantoj de la terlaboristoj, kiuj batalis kontraŭ la malnova maljusta sociordo, kaj hodiaŭ konstruas la socialisman transformadon de la vilaĝa mastrumo. Tiuj abnegaciaj kaj klarvidaj pioniroj de la feliĉa vivo de la kamparanoj kuraĝe batalas kiel por pli bona organizado de la laboroperacioj en la mal-

simpla terkultura mastrumado, tiel ankaŭ por ĝusta orientiĝo de la pensmaniero de la kamparanoj. Nature, la materialaj ŝanĝoj efektiviĝas pli rapide ol la ŝanĝoj en la ideologio de la homoj, sed progreso tamen estas videbla ankaŭ en tiu spirita sfero.

La aŭtoro malkaŝas la obstaklojn kiuj kaŭzis al tiu progresema marŝo de la aferoj en la socia vivo de hungaraj vilaĝanoj la metodoj de la periodo de kulto al la personeco. Feliĉe ankaŭ tiurilate oni faris multon por likvidi tiujn malutilajn metodojn. La leganto komprenas, ke jam normaliĝis aŭ estas en proceso de normaligo la multaspekta vivo en la hungara vilaĝo.

Oni devas rekonili la majstrecon de la aŭtoro doni tre koncize riĉan pentraĵon de la epoko, de la tipoj, de la problemoj en la vilaĝo. Malgraŭ certaj specifikaĵoj (iam tre gravaj) de la vivo en la malnova hungara vilaĝo, oni povas kun kontento konstati multajn tipajn trajtojn en la vilaĝanaro vivo en socialisma Hungario, kiuj tre similas al procedoj kaj fenomenoj en la vivo de la kamparanoj en aliaj socialismaj landoj, ekz. ĉe ni en Bulgario. Tio estas klarigebla per la fakto ke la sociordo en ambaŭ landoj estas samtipa, socialisma.

La lingvaĵo de la aŭtoro estas interese prezentita en esperanta traduko, farita de konataj tre spertaj hungaraj tradukistoj kaj redaktita de mondfama majstro — nia ŝatata Kalomano Kaloczay.

Mi ne ĉiam aprobas la emon uzadi nepre novajn vortojn, kiujn oni povas eviti kaj tamen ne malpli elokvente prezenti la pensojn de la aŭtoro.

La libro indas ĉies atenton.

N. Aleksiev

La naturo estas tia servisto al la homo, kiun ni devas estimi kun adoro. Ĝi meritas la plej altan ordenon.

Kaj ĝia ordeno estas la arbaro. Ĝi ornamas ĝian belstaturan bruston.



DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Societo „Supreniro“ intencas organizi ekspozicion „Esperanto en la mondo“. Ni petas ĉiujn eksterlandajn esperantistojn helpi al ni en tiu ĉi afero. Esperantaĵojn, b. k. kaj aliajn materialojn vi povas sendi al jena adreso: Esperanto societo „Supreniro“ vilaĝo Pavel Banja, distrikto de Stara Zagora. Rekompence vi ricevos niajn esperantaĵojn laŭ via deziro.

Sašo Vragolomov (27-jara), nova esperantisto, kv. Tolbuhin, bl. 8/1, Pernik — kun ĉl.

Rosica Todorova Jivkova (25-jara fraŭlino, flegistino), kv. Rajkovo, Smoljan — kun ĉl.

Fino Efrosina Ivanova (22-jara), Prohlada 26, Plovdiv 6 — kun tuta mondo, BK, fotoj de aktoroj.

Novaj, sed tre lertaj geesperantistoj (inter 25—45 jaroj) deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu al la kursgvidantino: Vasja Petrova, str. Balkan 10, Sofio.

Dudekok geesperantistoj-gelernantoj (13—17 jaraĝaj) komencantoj deziras korespondi kun ĝejunuloj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Ĉiu ricevos respondon. Skribu al la kursgvidanto: Simeon Baltaĝiev, urbo Bjala, distrikto de Ruse.

Tanja Aleksandrova (15-jara lernantino) Sofia IV, ul. Al. Konstantinov 1, — deziras interŝanĝi il. k. kun ĉl.

Ĉeĥoslovakio.

Jaroslav Šperling (46-jara), Heydukova 11, Praha 8 — Liben — kun bulgaroj pri turismo, BK, insignoj, alumetetikadoj, esperantaĵoj k.a. Sřifary, Gerkeho 25, Hana Hadoĉeva (knabino).

Jehrava, Leninova 34, Jan Klimeš (lernanto).

Danio

Pr. Sonderbyrg, Kirkevej 19, Ulkebol Kirke, Peder Chr. Gaarde (53-jaraĝa).

GDR

821 Reeitel—1, Nhlandstr. 15, Erich Fleischer (58-jaraĝa).

Germanio

Kirchstr. 41, 3003 Schwarmstedt, Regina Eschnbach, (knabino).

Hispanio

Barcelona 5, La tortedo, T. Alberih.

Jugoslavio

Branka Leontiĉ (34-jara) instruistino, Šabac, Trg 23 oktobra 3/1—8 — deziras kor. kun tuta mondo.

Nederlando

Rotterdam 12, Vergertmijniestr. 256, Afr.J. Calado.

Pollando

Barbara Lojek (17-jara lernantino), ul. Belojanisa 29/3, Gliwice—kun ĉiuj landoj pri literaturo, muziko, filatelio; kolektas PM, BK, diskojn.

Lubin, woj. Wrocław, Krzeczyn wielki, Nikolaj Dziadek (20-jara ministo).

Chelmeli pow. Chrzanow 420, woj. Krakow, Ryszavet Piichaata (18-jara knabo).

Rzeszow, Osiedle XX, Lecia 31/4, Antoni Kaplita (20-jara junulo).

Glivice, Belojaniska 29/3, Barbara Tojek (17-jara knabino).

Czestechowa, ul. Bec 28 m 4, Teresa Grabowska (19-jara knabino).

Inowroclaw, Nowotki 24 m 19, Bielak Stefan.

Rzeszow, Obr. Stalingradu 43/2 m 17, Andrej Zremba (17-jara knabo).

Deblin, Staromiejzka 18, Marian Moryc.

Czestochowa 1, P. O. Box 44, Stanislav Bilsiada (plenaĝa).

Poznan, Sniadeckich 26/2, Marko Jaukowiak (13-jara).

Gdansk — 7, Chodkiewicza 22, Aleksander Bersekiewicz (viro).

Pultesk, 1 Maja 20, Irena Bober (17-jara knabino).

Prezedmosc, pta Praskka, prow. Wielun, woj. Lodz, Jan Czechawski (18-jara studento).

Nowy sacz 1, Wigiejska 44/4, Bozena Kura (knabino).

Bochnia, Pedagogia Liceo, kl. IV e, Zofia Hebola (knabino).

Lodz, Wl. Bytomskiej 58, m 38, Lucyna Beksulak (lernantino).

Nowy sacz 1, Zaromskiego 16, Liceom III, Helena Czynalska (knabino).

Bechnia, Pedagogia Liceo, kl. IV e, Andreo Woda (knabo).

Nowy Sacz 1, Sienkiewicza 37, Aleksander Grela (instruisto).

Szczakowa, Kosciuszki 3, Franciszek Skalniak, (41-jaraĝa).

Rumanio

Reg. Gluj Nasaud, Libertati 14, Anitii Doina (lernantino).

Reg. Cluj Nasaud, Samasului 12, Tolja Marioava (lernantino).

Reg. Cluj Nasaud, S. Boslun 7, Cheorshe Stelian (knabo).

Reg. Cluj Nasaud, Libertati 14, Buta Nelu (lernanto).

„Nova Vojo“, Olvedy Karolo F.C.L. Raj:Gheorgheni Reg: M.A.M. — la membroj de la supra E-klubo dez. kor. kun ĉi pri kuracistaj aferoj, turismo, loĝakulturo, nutraĵindustrio.

USONO

Rhea C. Stone, 2500 2 nd. Ave., Sacramento, Calif., 95818 Usono — kun bulgaroj pri polkutimoj, historio, rakontoj, fabeloj.

USSR

Vjačeslav Ivanov (22-jara), Ljotnaja 60—36, Ivanovo — 22 — dez. kor. kun diversaj landoj, interesiĝas — sociaj problemoj, moroj, junularaj aferoj. Respondo certa.

Estonio, Talinn—1, Narva mnt 25—5, Lemvit Ojalo (13-jara knabo).

Litovio, Plunges raj., Alsedziaj, Rimantas Sirkontas.

Taŝkent 3, Uzgarimi pr. Kirki 2, Kukinu A. (21-jara studento).

Ukrainio, Sumskoj obl. Ŝostka, K. Marksa 80, E. Ĉepik.

Taŝkent 15, Mukimi d 106 kv. 4, Aunapu Larisa (17-jara knabino).

Estonio, Saaremaa, Kingissepat koidu 39, M Paju (17-jara knabo).

Ukrainio, Ŝumskoj obl. Ŝostka, Raboĉaja 17/22 Jejel N.

Estonio, Tallinn 21, Lääne tee 8—2, Aino-Ahond (kelkaj lernantoj).

Rostov na Don 33, Zavodskaja 25, Viktor Zajčenko.

Volgograd, Zakarp. obl., Frunze 30, Rebrik Nadija (lernantino).

BIBLIOGRAFIO

J. F. Berger, **Niko kaj Nina**. Postkursa leĝolibreto originala. P. 71, 19×12 cm., broŝurita, prezo — 8 steloj.

R. C. Muschler, **La Nekonatino** (trad. L. Goppel), novelo. P. 66, 19, 5×12 cm., broŝ. — 6²/₃ steloj, bind. — 10 steloj.

Ludwig Wegner, **La arto fariĝi centjara** (Maniero resti juna longtempe). P. 60, 19×12 cm., broŝ. — 6²/₃ steloj.

A. B. Krempel, **Letero el la transcendo** (trad. M. M. Mielert). P. 35, 19×12 cm., broŝ. — 4 steloj.

Joseph von Eichendorff, **El la vlvo de Netaŭgulo** (trad. Paul Bennemann). P. 140, bind. — 16 steloj.

Walter Galdert, **Trifoje akurate je la dekdua horo**. (trad. Friedrich Ellersiek), romano. P. 160, 18, 5×12 cm., bind. — 16¹/₃ steloj.

Kremenz Wiczorek, **Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco**. P. 39, 12×14,5 cm., broŝ. — 6 steloj.

Jurularo kantas, kompilita de Germana Esperanto-Junularo. P. 144, broŝ.—10 steloj, bind. — 12²/₃ steloj.

Johana Pagenstecher, **Sageoj kaj rakontoj laŭlonge de l' Rejno**. P. 47, 19×12 cm.

AGRIKULTURA BULTENO, organo de Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE), Redaktejo str. Oborište 15, Paŝtera, Bulgario, 6 numero, 1967 jaro, kun jena enhavo:

Al konscia kaj obstina laboro dum 1967

Raporto pri la agado de ISAE

Saluton al vi, agrikulturistoj!

NRV — efika stimulo por bestoj kaj plantoj

Postkongresa vizito de hungara agrikultura kooperativo

La primolo de Rila-montaro

kart. — 9¹/₂ steloj.

Ĉefeĉ — ŝlosilo germana. P. 32, 12×8 cm., 1 stelo.

Ĉiuj 10 libroj estas liverataj de Esperanto Eldonejo. Ludwig Pickel, postfach 2113, D 85 Nürnberg, Germanio.

D-ro Viktor Sadler, Esperanta — Sinhala Vortareto, P. 28, 18,5×12 cm., eldonas Universala Esperanto-Asocio.

Vladimir Majakovskij, **Bone! Poemo de l' Oktobro** (trad. K. Gusev, kun komentoj). Moskvo, 1967. Eld. Komisiono pri internaciaj ligoj de Sovetaj esperantistoj. P. 108, 20×15 cm.

Dipl. ing. Rudolf Haferkorn, Technisches Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Esperanto press, Cardiff, Ontario, Kanado, Pli ol 5000 terminoj, difinoj de 308 radikoj mankantaj en Plena Vortaro kaj Suplemento aŭ alimaniere difinitaj. P. 84, 16×11,5 cm. Prezo — 24 steloj.

Téo Jung, Preĝo („Ho donu al mi vastan koron!“). Kompozicio en versoj. Konvena por deklamado dum Zamenhof-festo aŭ alia esperantista soleno. Lukseta eldono (16 paĝoj kaj kovrilo). Ĉiu ekzemplero estas numerita kaj aŭtografita de la aŭtoro. 17×11 cm. Prezo 1.50 gld. plus 0.20 por sendkostoj.

Radioaktivaj izotopoj je servo de agrikulturo
Agrikulturaj maŝinoj en la Internacia Foiro de Plovdiv.

La vojo de hungara agrikulturo

„Apimondia“ — Internacia Federacio de Asocio de Abelbredado

Mallongaj agrikulturaj novaĵoj

Nia recenzrubriko

Kiamaniere membri al ILASE kaj aboni la revuon „Agrikultura Bulteno“

Nia poŝtkesto, informoj kaj respondoj de la Redakcio.